

RETKOMUNIKOJ 2009/1

ĈEA-retkomunikoj estas neregula informilo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendata al ĉiuj rete atingeblaj membroj de ĈEA sed ankaŭ al nemembroj, kiuj per ajna maniero montris intereson pri la Esperanto-movado en Ĉeĥio. Ĝi neniam enhavas aldonaĵojn. Se vi tamen ne volas ricevadi ĝin, sufiĉas respondi per simpla "ne sendadu" kaj ni tuj eligos vin de la dissendolisto.

ENHAVO:

1. La ĈEA-retkomunikoj ekde nun Unicode
2. Gravaj voĉdonoj rilate al Esperanto
3. ALVOKO: Nova ekspozicio en Esperanto-muzeo Svitavy
4. Ekspozicio pri Komenio kaj Zamenhof en Moravské Budějovice
5. Du ceteraj renkontiĝoj en februaro
6. Ĉeĥa Esperanto-junularo aktivas
7. Esperanto-Kalendaro

1. LA ĈEA-RETKOMUNIKOJ EKDE NUN UNIKODE

Post nia demando en la lastaj retkomunikoj de 2008, ĉu iu havas problemon bone vidi la supersignitajn literoj reagis nur unuopuloj kaj mi forte esperas, ek ankaŭ ili jam laŭ la konsiloj de Marek Blahuš sukcesis gajni la batalon kontraŭ iliaj komputiloj kaj ne estos plu kialo kripli nian belan lingvon per ajna surrogato. Mi ripetas, por tiuj, kiuj pasintnumere pretervidis tion kaj nun ne povas bonelegi la supersignitajn literojn: bv. bv. skribi al cxea@blahus.cz, menciante, kian poŝtilon (Outlook Express, Mozilla Thunderbird, ...) kaj kian operacian sistemon (Windows XP, Windows 95, ...) vi uzas, kaj Marek klopodos konsili al vi, kiel ŝanĝi la agordon de via komputilo, ke ankaŭ vi povu legi la tekston en bela Esperanto-alfabeto.

2. GRAVAJ VOĈDONOJ RILATE AL ESPERANTO

La membrino de Eŭropa parlamento Ljudmila Novak (Slovenio) prezentis la 21-an de januaro 2009 al la Eŭropa Parlamento en Komitato por Kulturo sub la signo: PE 416.668v01-00 kadre de debato pri la raporto/opinio pri multlingveco de Vasco Graca Moura tri proponojn pri ŝanĝoj de artikolo 4:*

- konstatas ke la principo de estimo de egalrajteco ne povas esti certigita dum oni uzas nacian lingvon (la anglan) kiel »lingua franca«.

- proponas, ke konservante kaj uzante vivajn lingvojn, estimante lingvan diversecon kaj stimulant lernadon de diversaj lingvoj oni pristudu la eblecon kaj utilecon de enkonduko de komuna artefarita lingvo en EU, ekzemple Esperanto. Nur ĝi povus faciligi interkompreniĝadon en Eŭropo kaj kun loĝantoj de aliaj kontinentoj, ĉar ĝi estas simplapor lernado kaj uzo.

- konstatas, ke la enkonduko de eŭro kiel komuna eŭropa monunuo, ege faciligis komercadon inter la ŝtatoj kaj helpis al ekonomia kresko kaj pli granda stabileco en EU. Similajn efektojn

povus havi ankaŭ enkonduko de komuna komuniklingvo, kiu ja neniel forigus aŭ limigus uzon de naciaj kaj aliaj vivaj lingvoj uzataj en EU.

Ĉiuj de vi, kiuj subtenas la proponon, bv. montri tion minimume per voĉdono JES sur la paĝo: <http://answers.poll daddy.com/poll/1319680/?msg=commentAdd#comment173418>

Memkomprene, konvena komentario ankaŭ estas bonvenigata. Ĝis nun voĉdonis 2320 voĉoj POR, 3 KONTRAŬ, 3 MI NE SCIAS kaj 6 CETERAJ.

Verŝajne vi ĉiuj scias pri la voĉdonado en la retejo www.CHANGE.ORG (proponoj por Brack Obama), kie relative tre bone sukcesis la propono enkonduki Esperanton en usonajn lernejojn kiel unuan lingvon. Ĝi ne estis inter tiuj prezentitaj al Usona ŝtatprezidanto, sed jes kiel 20-a ĝi estos plu traktata.

Similajn voĉdonojn nun okazadas sur preskaŭ ĉiuj naciaj segmentoj de <http://www.european-citizens-consultations.eu/>. Se vi klakos al la ĉeĥa flago, vi trovos <http://www.rozhovory-s-obcany-evropy.eu/>

, kie vi povas registriĝi kaj sekve sur <http://www.rozhovory-s-obcany-evropy.eu/forum-list> voĉdoni por la propono de František Horáček "Postupné zavedení esperanta jako základního jazyka Evropské unie". Momente ĝi havas 36 voĉojn kaj estas en la unua pozicio, la dua estas propono "Legalizace/Dekriminalizace konopí".

Similaj proponoj estas ankaŭ en pluraj aliaj naciaj paĝoj. Bedaŭrinde ne en la slovaka, kiun mi volis ankaŭ subskribi, sed jes en la angla, germana, pola, hungara kaj multaj aliaj. Kiuj volas helpi ankaŭ al ili sciu, ke necesas denove aliĝi por ĉiu aparta nacia paĝo tuj post alklako al la koncerna paĝo. La proceduro estas la sama, do eĉ eblas voĉdoni en la lingvoj, kiujn oni ne konas :-). Eble iu slovaka abonato de ĈEA-retkomunikoj metas ankaŭ tien iun similan proponon?

Pro ĝenerala malintereso pri EU-aferoj inter niaj civitanoj estas espero, ke ni restos en la pinto de la proponoj ĝis la fino, do ĉar temas pri oficiala paĝaro de EU, per tiu voĉdonado ni helpas, ke la EU-instancoj devas almenaŭ iel atenti Esperanton.

Antaŭdankon al ĉiuj, kiuj per siaj voĉoj helpas al tio!

3. ALVOKO: NOVA EKSPozICIO EN ESPERANTO MUZEO SVITAVY La 28-an de februaro estas planat inaŭguro de nova ekspozicio en Esperanto-muzeo Svitavy. Ĝi estos dediĉita ĉefe al la 40-a datreveno de la fondo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, sed ĝi dediĉos ankaŭ konsiderindan parton al Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Tamen, ni ne havas ankoraŭ sufiĉe da materialoj, tial ni petas ĉiujn, kiuj posedas ion interesan (fotojn, dokumentojn, io ajn alia) kio dokumentas la agadon de ĈEA kaj ĝia junulara sekcio, sed ankaŭ la movadon antaŭan (precipe, sed ne nur tiuj kluboj, kiuj jam festis sian centjariĝon), ke vi disponigu tion ekspoziciele. Tamen ATENTU: ne sendu tion, sed unue skribu prefere al kolektiva ardeso muzeagrupo@esperanto.cz kion vi posedas kaj sub kiaj kondiĉoj vipretas tion disponigi (ĉu donaci al la E-muzeo, ĉu nur pruntedoni). Sekve post pritakso, ke tio estus interesa ekspozicato, vi estos petata tion sendi, kun la indiko de la adreso kien.

4. EKSPozICIO PRI KOMENIO KAJ ZAMENHOF EN MORAVSKÉ BUDĚJOVICE La Zamenhof-jaro, solene inaŭgurita ĉe Unesko la dekkvinan de decembro 2008 estas certe grava inspiraĵo por ni ĉiuj. Kaj ni gratulu al Viktor Dvořák, kiu havas la plej grandan meriton, ke la

urba kultura centro Beseda en Moravské Budějovice okazos jam de ĉi-sabate ekspozicion, kiu nomiĝos "Pocta Komenskému aneb jak se domluvíme v EU?", kiu grandparte prezentos nian majstron kaj la internacian lingvon Esperanto. La solena inaŭguro de la ekspozicio, kiu okazos en la ekspoziciejo "Zámecké konírny" okazos la 7-an de februaro je 15:00 kaj ĝi daŭros ĝis la 27-a de februaro. Pliaj informoj ĉe: Viktor & Libuše Dvořákovi <dvorakovi.mb@volny.cz>

5. DU CETERAJ RENKONTOĜOJ EN FEBRUARO

Ĉi-sabate, la 7-an de februaro okazos Esperanto-renkontio omaĝe al centjariĝo de Klubo esperantista en Prostějov. Info: dundeejarek@seznam.cz

Sabate la 28-an de februaro okazos Esperanto-renkontiĝo en Svitavy kun trarigardo de la Esperanto-Muzeo, sed sekve ankaŭ de la ekspozicioj en la Urba Muzo, rakontoj de Kvido Janík pri vojaĝoj tra Libio kaj Jordanio, tombolo kaj raportoj el la Esperanto-kluboj de la regionokun sekva diskuto. Pli da informoj vi ricevos ĉe Libuše Dvořáková, <dvor.libuse@seznam.cz>

6. ĈEĤA ESPERANTO-JUNULARO-AKTIVAS (oficiala organo de ĈEJ redaktata de Marek Blahuš)

Pro la foresto de la redaktoro eksterlande ĝi ĉi-foje makas, kio ne signifas, ke ĈEJ ne aktivu. Eĉ male, ĝi preparas la unuan TEJO-kongreson en Liberec, la unuan fojon sur la teritorio de Ĉeĥio. Certe en venonta numero de ĈEA-retkomunikoj ni jam denove povos legi pri la ĈEJ-aktivecoj.

7. ESPERANRO-KALENDARO

Atentu, ke venontnumere ni denove publikos la kompletan kalendaron de Esperanto-aranĝoj en Ĉeĥio aŭ tiuj eksterlande, kiuj estas organizitaj el Ĉeĥio aŭ kien oni organizos grupan viziton el Ĉeĥio. Ĉu ĝi estos vere KOMPLETA dependas de vi: bv. ne forgesi sendi informojn pri via aranĝo al chrdle@kava-pech.cz, konsistanta minimume de la indiko de nomo de la aranĝo, loko, dato kaj retadreso de la organizanto, kie eblas ricevi pliajn informojn kaj aliĝilojn.

Kaj ne forgesu, ke la plej kompleta, daŭre konsultebla trarigardo de Esperanto-aranĝoj eksterlande troviĝas ĉe <http://www.eventoj.hu/kalendar.htm>